# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (950) • 2021 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



*Kongresanoj dum kristana kongreso en Legnica 2021*

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe Cousson
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof Åradsson
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Kongresa raporto | 99 |
| Salutvortoj al la kongreso | 106 |
| Kion vi elektus | 107 |
| Ekologio en infanĝardeno | 108 |
| Invito kaj aliĝilo al kristana kongreso, 71a kongreso de KELI | 110 |
| Dag Hammarskjäld - 60 jaroj post morto | 114 |
| Bona konduto de kristanoj | 115 |
| Invito al Bibliaj tagoj | 116 |
| La poemo de savo | 118 |
| Preĝo de sereneco | 118 |
| Informetoj | 119 |
| Nu, kien iras mia viv' | 120 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, en ĉi-tiu gazeto vi povas legi raporton pri nia somera kongreso kaj kelkajn erojn el la enhavo. La enkondukan prelegon de nia kongreso vi povis legi jam en la antaŭa numero, kaj mi proponas ke vi legu tiun denove. Pli da prelegoj faritaj dum la kongreso aperos en sekvontaj numeroj.

Krome vi trovos du invitojn kaj aliĝilojn en la gazeto. La unua okazaĵo estas la Bibliaj tagoj, kiu okazos en marto en Trier, Germanio. Alia invitilo estas al la sekvontjara kristana kongreso, kiu okazos julio en Domaszék, suda Hungario.

Espereble vi havos kaj tempon kaj forton partopreni en la renkontiĝoj kaj ankaŭ kuraĝon fizike renkontiĝi kun aliaj kristanoj kaj esperantistoj. Ni bezonas tiun proksiman kontakton unu kun la alia, ne sufiĉas nur vidi konatulojn per komputila ekrano.

Mi deziras al vi interesan legadon.

# Kongresa raporto — 70a KELI-kongreso

## Legnica, Pollando en 2021

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Nia ĉijara kongreso en multaj aspektoj estis nekutima.

Unue: en la pasinta jaro pro la pandemio ni bedaŭrinde devis nuligi nian kongreson, ĉar la cirkonstancoj ne permesis okazigi ĝin.

Due: nia kara katolika fratino, Teresa Pomorska el Polllando, estis preta organizi nian renkontiĝon en la ĉarma pola urbeto Legnica, pro tio ne estis nur KELI-kongreso, kaj pro tio ni nomis ĝin Kristana Esperanto-Kongreso.

Trie: pro striktaj reguloj kaj eblaj vojaĝaj malfacilaĵoj, kaj pro aliaj kaŭzoj multaj KELI-anoj ne kuraĝis longe vojaĝi, kaj en la kongreso partoprenis plej parte lokaj, polaj homoj, kiuj ne devis iri eksterlanden.

Do, ni alvenis kun granda ĝojo kaj espero, ke post du jaroj ni fine povos renkontiĝi kun malnovaj geamikoj – kaj unuafoje ni povos renkontiĝi kun ne-konataj homoj, kun eblaj novaj geamikoj!

### Sabate, 7an de aŭgusto

Nia kongresejo estis belega granda konstruaĵo proksima al la urbcentro – la domo (1) de la Supera Teologia Seminario. Sub unu tegmento ni havis simplajn, sed komfortajn ĉambrojn, manĝsalonon, du salonojn (2), kie ni povis aŭskulti prelegojn kaj okazigi aliajn programerojn kaj ankaŭ kapelon por sanktaj mesoj.

Post la posttagmeza alveno kaj frua

1



2



3





vespermanĝo ni promenis al bela evangeliana luterana preĝejo (3), kie ensemblo de malnova muziko “Kamerata Autentik” (4) donis al ni koncerton. Post la muziko, per la helpo de ĉarma ĉiĉeronino (5), ni komencis iomete konatiĝi kun la urbo.

Reveninte al la kongresejo ni havis interkonan vesperon: el la partoprenantoj mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Hungario) faris hazardajn parojn, kiuj post iomete da babilado devis prezenti unu la alian. La hazardo bone funkciis: tuj komencis amikiĝi la homoj kaj ni havis vere gajan vesperon, kiun fermis la vesperpreĝo gvidata de Philippe Cousson, Francio.

## Dimanĉe, 8an de aŭgusto

Post la matenmanĝo ni lernis la kantojn, kiuj estis planitaj por kantado dum la ekumena diservo kaj dum la katolika meso.

La tago komenciĝis per la malferma prelego de Philippe Cousson (6) pri la temo de nia ĉijara kongreso: “… kaj gardu ĝin”. (Genezo 2, 15).

Poste okazis la ekumena diservo kaj la sankta meso. Post la tagmanĝo per buso ni iris al Lubiąż, kie ni vizitis grandiozan postcistercianan monaĥejan komplekson. En la impona Princa Salono la jam konata grupo “Kamerata Autentik” muzikis al ni, kaj poste kiel oficiala malfermo de nia kongreso salutis nin la luterana episkopo Waldemar Pytel (7) – esperantlingve!

Post la vespermanĝo okazis en la kongresejo malgranda muzikfesto (8) okaze de jubileoj de pastroj Kazimierz Noculak kaj Andrzej Siemiński el Vroclavo (novulo inter esperantistoj).

Ni finis la tagon per vespera preĝo: mi per enkonduko komencis mian preĝ-


4


5


6


7

serion pri la dekalogo laŭ la predikoj de mia avo József Farkas (hungara protestanta pastoro). Dum la kongreso la matenaj kaj la vesperaj preĝoj estis pri tiu temo kaj mi kondukis ilin (9).


8


## Lunde, 9an de aŭgusto

Post la kutimaj matenaj programoj (matenmanĝo, matenpreĝo kaj kantado) ni pilgrimis laŭ la vojo de Sankta Olafo per la helpo de prelego kaj bildoj de Adam Leźak, Pollando (10).


9

Inter la partoprenantoj estis personoj, kiuj nun komencis lerni nian ŝatatan lingvon – kaj ankaŭ estis volontuloj, kiuj dum la antaŭtagmezaj prelegoj faris lingvan kurson por la komencantoj, gvidata ĉarme de Jolanta Kieres el Nowy Sącz (11)!

Post la sankta meso kaj tagmanĝo per buso ni vojaĝis al la urbo Swidnica, kie ni vizitis interesan historian urboplacon kaj de la vidturo ni rigardis panoramon de la urbo. Kulmina punkto de la vizito estis belega ligna evangelia luterana Kirko de Paco, en kiu denove ni aŭskultis la muzikon de la jam konata ensemblo de malnova muziko. Donacante al la episkopo Waldemar Pytel esperantlingvan Biblion ni dankis al li pro la invito kaj ĉarma akcepto de nia vizito.


10

Vespere ni daŭrigis la konatiĝon unu kun la alia per demandoj "Kiu estas inter ni, kiu…" jam sidis sur kamelo, vizitis prizonon, havas tri gefratojn, ktp. Kompreneble multaj ŝercaj historioj, rememoroj sekvis la respondojn.


11

## Marde 10an de aŭgusto

Antaŭtagmeze ni aŭskultis du interesajn prelegojn: unue Bengt Olof Åradsson

parolis pri la sveda aktivistino Greta Thunberg, [Greta Tünberg] (12) poste mi rakontis pri la belega laboro de la brazila fotisto Sebastião Salgado rekultivi arbojn, eĉ arbarojn.

Posttagmeze ni per trajno vojaĝis al Jawor, kie alia belega evangeliana ligna Kirko de Paco atendis nin.

Dum la tuta kongreso brile tradukis al ni el la pola lingvo la slovako Pavol Petrik (13).

Post la vespermanĝo ni havis biblian rondon kaj vesperpreĝon.

## Merkrede 11an de aŭgusto

Post la kutimaj matenaj programeroj ni per trajno iris al la urbo Bolesławiec, kie unue ni havis tre interesan viziton en ceramika fabriko. Nia simpatia gvidanto montris la tutan produktadon kaj senlace respondis al niaj demandoj. Bonŝance post la vizito ni havis eblecon aĉeti ceramikaĵojn en la vendejo de la fabriko!

Poste ni vizitis ankaŭ la centron de la urbo (14), la malnovan urban muron, kaj aŭskultis interesajn historiojn de nia ĉarma ĉiĉeronino, kiu ĉifoje estis Zofia Śmistek, partoprenantino de nia kongreso.

Nia lasta programero en Bolesławiec estis la vizito al la impona baroka katedralo.

Per trajno ni iris hejmen kaj post la vespermanĝo ankoraŭ atendis nin belega koncerto de du ege talentaj pianistinoj, fratinoj: Aleksandra kaj Julia Czajka (15). Ni jam ekkonis ilin iomete dimanĉe dum la festeto de jubileoj, do ni multe ĝojis denove kaj pli longe aŭdi ilian muzikadon. Certe ni ankoraŭ aŭdos pri ili!



12


13


14


15

## Ĵaŭde, 12an de aŭgusto

Antaŭtagmeze Grażyna Szubryczyńska el Toruń faris interesan prelegon pri tio, kiel ili instruas en sia infanĝardeno la infanojn gardi la naturon (16).



16

Poste Philippe Cousson kaj Bengt Olof Åradsson gvidis lingvan interparolon pri interesaĵoj, pri ne ĉiam bone uzitaj vortoj, pri ne certaj reguloj. La partoprenantoj vigle diskutis kun ili.

Posttagmeze KELI-anoj havis kunvenon, kiu laŭregule ne povis esti oficiala jarkunveno pro la malmultaj partoprenantoj, sed ni povis ŝanĝi la informojn pri niaj geamikoj, kiuj ĉijare ne povis esti inter ni, kaj ankaŭ la planon pri la sekvontjara kongreso (pri kio vi trovas detalajn informojn en la gazeto!)


17

Ni ankaŭ promenis en la urbo Legnica kaj ekkonis interesaĵojn pri la kvartalo, kiun antaŭe okupis la rusa armeo.

Post la vespermanĝo ni iris al kultura domo, kie ni povis ĝui la prezentadon de popoldancoj de ensemblo Legnica (17).

## Vendrede 13an de aŭgusto

Post matenmanĝo, matena preĝo kaj kantado pastoro Kazimierz Noculak faris prelegon per la titolo “Kion vi volus elekti?” (18).


18

Poste ni havis poezian kaj muzikan antaŭtagmezon kun Wojciech Ławnikowicz, kiu kantis akompanante sin per gitaro kaj kun Halina Kuropatnicka-Salamon, kiu legis siajn versaĵojn (19).

Posttagmeze ni iris al la katolika preĝejo, kie ni aŭskultis la koncerton de Armand Perykietko (20).

Post tiom da program-plenaj tagoj ni alvenis al la lasta vespero.


19

Unue Philippe Cousson kaj Roman Gmyrek fermis nian ĉijaran kongreson per mallonga ekumena Diservo (21).

Poste la multaj aktivaj partoprenantoj faris viglan kaj multkoloran adiaŭan vesperon (22–24).

Ni auskultis kantojn kaj poemojn, ridis pri ŝercoj kaj vidis dancojn. Ni vere havis enhavriĉan vesperon!

Ni ankaŭ dankis pro la laboro de tiuj homoj, kiuj senlace laboris por nia bonfarto, nome: Bogdan Dembiec (kaj al Ewa Tacz, kiu pro gravaj kialoj bedaŭrinde ne povis esti kun ni) kaj Aneta Wacowska la helpon al la organizado, al Pavol Petrik pro la tradukado dum la ekskursoj, kaj kompreneble al Teresa Pomorska la organizadon de nia ĉijara renkontiĝo.

Dio helpu nin ĉiujn, ke ni povu sekvontsomere renkontiĝi en Hungario, en Domaszék!


(Fotis Oldřich Fischer kaj Bengt Olof Åradsson)


20


21


22


23


24


25

# Fotomiksaĵo










# Salutvortoj al la kongreso

## Legnica, 8an de aŭgusto 2021

Gesinjoroj, mi kore dankas pro la invito al la hodiaŭa kunveno malfermanta la internacian kongreson de kristanaj esperantistoj. Kiel kredantoj, ni staras kune sur la fundamento de la Sanktaj Skriboj. Unu el la unuaj rakontoj en ĝi, priskribas la distancon de la homaro al Dio kaj konsekvence konfuzon de lingvoj dum la konstruado de la Babela Turo. Vi faras tute male. Vi estas ligitaj per komuna lingvo kaj samtempe vi serĉas kontakton kun la Kreinto, konsciante pri respondeco rilate la mondon, en kiu la Dio nin starigis.

Mi sincere gratulas al vi pro la iniciato de la renkontiĝo, la bela pasio, fido kaj ekologia sentemo, kiu estis esprimita en la temo de la kunveno. Mi deziras al vi profundan pripensadon, longajn interparolojn, fruktodonan kongreson kaj ĉiutage la benon de Dio.

Episkopo ***Waldemar Pytel***

Estimataj kongresanoj, ni esperantistoj, ofertas al la universala eklezio niajn servojn por prediki la Evangelion al ĉiuj nacioj, establi ekumenajn kontaktojn, kaj konstrui pontojn al kompreno kun ĉiuj homoj de bona volo. Nia deziro estas, ke Esperanto fariĝu komuna rimedo de interkompreniĝo por ĉiuj kristanoj tra la mondo kaj modelo por ĉiuj aliaj. Ni venis al Legnica por kune realigi ĉi tiujn defiojn.

Estas honoro por mi saluti vin nome de ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio. Mi ĝojas havi la okazon por salutvorti al Kristana kongreso kadre de 70a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, kiu okazigas en Legnica en la tagoj 7–14a de aŭgusto 2021.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj per sia laboro en tiu ĉi kongreso kontribuas al pliriĉigo de la kultura kaj anima vivo de la Esperanto-movado.

Koran dankon al Silezia Esperanto-Asocio pro la organizado kaj okazigo de ĉi tiu ĉeesta kongreso, kiu malgraŭ la prokrasto de 2020 kaj malfacila pandemia periodo sukcesis gastigi ĉirkaŭ sesdek personojn el ok landoj.

Mi invitas vin travivi kune ĉi tiun eventon kiel okazon esti pli proksimaj anime unu la alian ene de nia esperantista familio.

Legnica — unu el plej malnovaj kaj belaj urboj de la Malsupra Silezio, certe restos longe en via memoro.

Mi deziras al vi multe da energio kaj ĝojo por alfronti la nuntempajn kaj estontajn defiojn kaj interligi multajn homojn. Profitu la kongreson: ĝuu, edukiĝu kaj pensu pri via kontribuo al nia komuna ideo.

***Robert Kaminski,*** Prezidanto de Pola Esperanto Asocio

# Kion vi elektus?

## Prelego dum la kristana kongreso 2021 en Legnica

Pastro Kazimierz Noculak, PL

Ĉi tiun demandon bonvolu respondi post la prelegeto. Mi povas jam diri ke la respondo estas ege malfacila.

Dum nia ĉiutaga vivo ofte ni travivis situaciojn kiam ni devis ion elekti. Elekti lernejon, profesion, studadon, edzon, edzinon, k.t.p.

Ofte okazis, ke nia elekto estis falsa. Tiam ni travivis seniluziiĝon

Mi nun parolos pri tute aliaj elektoj. Tio okazis en la urbo Vroclavo en konata restoracio apud la operdomo.

Mi renkontiĝis en la restoracio kun ĉi tiu instruisto por blinduloj. Li estis kune kun sia edzino. Ŝi ne estis blindulino. Ni tagmanĝis. Post tagmanĝo ni trinkis kafon kaj ni babilis inter alie pri nia laboro. Mi parolis pri surd-mutuloj kaj mi ekdemandis lin: Sinjoro bonvolu respondi: se vi havus eblecon elekti, kion vi elektus – ĉu blindecon aŭ surdecon?

Kiel vi pensas? Kion li elektis?

– Blindecon!

Neimageble por mi! Kial?

Li klarigis jene: Mi ŝatas homan voĉon, muzikon, kantojn de birdoj, bruon de maro kaj arbaroj k.t.p. Mi ĉiam elektus blindecon.

Permesu ke mi prezentu tre interesan okazaĵon, pri kiu mi tralegis en la internacia magazino sendependa Monato.

Iutage juna viro promenis fumante cigaredon sur unu el la urbaj ĉefstratoj. Tiam subite apud li eksplodis gastubejo. Li estis trafita de la ŝoko kaj perdis konscion. Vekiĝinte li trovis sin sur hospitala lito. Alvenis kuracisto, kiu demandis, kiel fartas la paciento. La juna viro observis la movadon de la buŝo de la kuracisto sed aŭdis nenion. Post la aŭdmezuraj ekzamenoj la kuracisto konstatis ke ĉiuj liaj aŭdorganoj estas neripareble detruitaj. Sed ne maltrankviliĝu, ni posedas novajn teknikojn por helpi vin venki la handikapon. La junulo forlasis malsanulejon kaj revenis hejmen. Tie li provis vivi normale kaj baldaŭ li konstatis, ke li ŝatas la silenton. Li ne plu sentis sin freniziĝanta pro la terura bruo! Lia menso kaj lia animo estis trankvilaj kaj kontentaj.

Lia vivo nun havas sencon kaj valoron. Kiam li estis revokita al konsultejo en hospitalo, li dankis la specialiston, sed rifuzis kirurgian helpon. "Mi estas kontenta", li diris. Kaj mi rekomendus la silenton al ĉiuj.

Ĉu ne interesa okazaĵo kaj nekredebla elekto.

Miaj karaj, resume: Du viroj elektas malsamajn kriplecojn.

Blindulo elektas blindecon, ĉar li ŝatas homan voĉon, muzikon, kantojn de birdoj, bruon de arbaro k.t.p. Juna viro elektas surdecon, ĉar li ne ŝatas bruon, li ne devas aŭskulti laŭtajn anoncojn surstrate, muzikaĉon en bazaroj k.t.p.

Kion vi elektus? ☙

# Ekologio en infanĝardeno

## Prelego dum la kristana kongreso 2021 en Legnica

Grażyna Szubryczyńska, PL

Formi la ĝustan sintenon al la naturo komenciĝu de frua aĝo, ĉar la homa konscio formiĝas dum la tuta vivo, sed ĝiaj fundamentoj akiriĝas en infanaĝo kaj adoleskeco, kiam junaj personoj estas sentemaj al ĉio, kio ĉirkaŭas ilin.

Alproksimigante la antaŭlernejajn infanojn al la naturo kaj alkutimigante ilin al ekologiaj danĝeroj, ĉiam gravas eduki ilin per propra sperto.

La edukado devas provizi fidindajn sciojn pri la temo, allogi imagon, veki, unuflanke, ekologian konsciencon, kaj aliflanke, sentemon al la beleco kaj riĉeco de la naturo, kaj ankaŭ formi la kapablon kaj volemon agi favore al la direkto.

Realigante ekologian edukadon, oni devas memori, ke ĝi ne povas inkluzivi nur instruadon, t.e. la transdonon de scioj, sed ankaŭ edukadon, t.e. formi por-ekologian sintenon.

Oni devas memori ankaŭ, ke ni loĝas sur planedo kun limigitaj rimedoj kaj estas neeble plenumi ĉiujn niajn dezirojn. Se mi prenos pli de la naturo ol mi bezonas, iu alia suferos.

Ĉiu pola infanĝardeno instruas pri ekologio. Mi priskribos, kion faras infanĝardena parto de ŝtata lernejo n-ro 35 en Toruń, kie mi nuntempe laboras.

Ĉiutage niaj 3-6-jaraj lernantoj havas personajn kontaktojn kun naturo: somere kuŝante sur herbejo aŭ ludante per sablo kaj akvo, aŭtune kolektante kolorajn foliojn, vintre gaje esplorante ecojn de neĝo. Ili sopiras neĝon kaj divenas, pro kio ĝi ne aperas tiom ofte: "Ĉar homoj ne plu estas amikoj de naturo kaj ĝi ofendiĝas". Ofte la etuloj brakumas arbojn – "Amikojn" interŝanĝante energion, do rompi iliajn branĉojn ricevas tute alian signifon. Dekkelkajn arbojn ĉe nia edukejo ni nomas arbaron. Infanoj ĝuas ĝian ombron kaj freŝecon, portas tie helikojn, se ili mem atingos danĝeran spacon, kie infanoj kuras, konstruas bastonetajn murojn por etaj kreskaĵoj. Ĉe la arbo troviĝas ankaŭ ĝardeneto, kie niaj lernantoj mem kultivas diversajn cepojn, aneton, petroselon por poste volonte manĝi ilin dum komuna tagmanĝo. De tempo al tempo ili mem produktas ekologian manĝaĵon: ekz. peklas brasikon aŭ pretigas cepan medikamenton.

Marte ni solene festas venon de printempo, aprile *Tagon de Tero*, septembre *Purigadon de la Tero*, marte *Tagon de Akvo* (tiam ni multe parolas pri landoj, en kiuj mankas akvo kaj samaĝanoj de niaj lernantoj devas porti ĝin ĉiutage de fora loko anstataŭ ludi aŭ lerni; ŝparado de akvo de postaj lecionoj havas tre profundan sencon). Lastjare tutan semajnon ni preparadis al *Festo de Abeloj*: renovigis "Ripozdometon por abeloj kun amikaro", semis ĉe ĝi mieldonajn kreskaĵojn kaj lernis kanton pri bonega por nia sano mielo.

Ni ankaŭ organizas multajn lecionojn pri segregado de ruboj kaj reciklado. Ĉe ĉiu



okazo ni uzas diversajn allogajn lernilojn kaj plurmediajn edukajn programojn. Dum tuta lernojaro infanoj kreas multegajn diversajn artaĵojn pri la temo.

Ni ĉiam strebas organizi renkontiĝojn kun profesiuloj pri ekologio. Bedaŭrinde pro la pandemio lasttempe ili ne estis multnombraj, sed al nia edukejo venis abelisto. Ni ekskursis al fabriko de ekologiaj manĝaĵoj kaj sukoj, arbara lernejo kaj ekologia bieno, kie infanoj havis personan kontakton kun farmbestoj, eksciis pri iama vivo en vilaĝo kaj provis memstare porti akvon de rivero, lavi vestaĵojn kaj melki kaprinon.

Nia infanĝardeno partoprenas diversajn tutpolajn projektojn, interinfanĝardenajn konkursojn kaj mem organizas ilin por aliaj edukejoj.

Niaj etuloj ofte plendas unu al la alia "Ekologio!", kio povas signifi: "Vi post forlaso de necesejo ne malŝaltis la lumon" aŭ "Vi forĵetis paperon al ĝenerala rubujo". La infanoj ne uzas vorton "Terglobo", sed "Nia planedo", kio montras, ke ili vere estas amikoj de la naturo.

Mi esperas, ke la eduko de nia infanĝardeno restos por ĉiam en la vivo de niaj lernantoj.





# Kristana Kongreso
# 71a kongreso de KELI

16–23 julio 2022

en Domaszék, Hungario

***" ... nenian diferencon inter ni kaj ili ..."***

(Agoj 15:9)

Karaj Gefratoj,
hungaraj kristanoj denove kore invitas vin partopreni Kristanan kongreson en nia lando!

La vilaĝo Domaszék situas apud la urbo Szeged, kiu estas 180 km sude de Budapeŝto, proksime al la landlimo al Serbio.

En tiu ĉi vilaĝo funkcias eduka kaj libertempa domo de la Romkatolika Eklezio, kies nomo estas "Zöldfás" (signifas Verdarba), kiu estos nia kongresejo.

La eduka centro estas en granda parko apud lago.

En la nova konstruaĵo, kiun ni uzos, estas ĉambroj (duŝejoj kaj necesejoj koridore), manĝ-salono, kapelo kaj preleg-salono (ekipita per la necesaj teknikaĵoj) – do ĉio sub unu tegmento.

En la granda parko troviĝas ankaŭ bela romkatolika preĝejo.

Se ni bezonos, dek du kabanoj estas en la parko je nia dispono.

Kaj interne kaj ekstere ĉio, kio ĉirkaŭos nin, estas preta servi por nia bono. Ni petu nian Sinjoron por beno, kaj preparu niajn korojn por akcepti tiun benon!

En ĉi tia hejmo ni estos kune en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu tion diras (Mateo 18, 20) :

> *"Ĉar kie du aŭ tri estas kune en mia nomo, tie en ilia mezo estas ankaŭ mi."*

Ni esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado.

***Loka Kongresa Komitato***

# ALIĜILO

**Sendota al RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes**
**H-1400 Budapest, Pf.: 5. Hungario, aŭ agnes@raczkevy-eotvos.com**

**Mi aliĝas al 71a KELI Kongreso 16–23 julio 2022 en Domaszék, Hungario**

S-ro ( ) /S-ino ( ) Persona nomo: ..........................................................

Familia nomo: ..........................................................

Adreso:
Lando (en Esperanto): ..........................................................

Urbo/vilaĝo: .......................................... Poŝtkodo: ..............................

Strato kaj numero: ..........................................................

Telefono: ..........................................................

Retadreso: ..........................................................

Mi preferas dividi la ĉambron kun: ..........................................................

Mi preferas loĝi sola: ( )

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): ..........................................

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): ..........................................

Mi planas alveni per: aŭtomobilo ( ), trajno ( ), buso ( ), aviadilo ( )

Mi estas vegetarano: ( ) Mi bezonas alian dieton: ....................................

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon: ..........................................................

Programerojn por distra vespero: ..........................................................

Alian programeron: ..........................................................

**La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo, kiun eblas pagi:**

al la banka konto de RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes

aŭ al la konto kelk-p de KELI ĉe UEA

aŭ al la konto de KELI ĉe CIC Lyonnaise de Banque en Francio


Mi permesas, ke la fotoj faritaj dum la kongreso oni rajtu publikigi kaj en la revuo Dia Regno kaj surrete. jes ( ) ne ( )

Dato: ....................... Subskribo: ..........................................................

# Domaszék, Hungario











# Kristana Kongreso
# 71a kongreso de KELI

16–23 julio 2022

en Domaszék, Hungario

Vi akceptas per la Aliĝilo la sekvontajn kotizojn:

**Tarifo A:** ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko
**Tarifo B:** ĉiuj aliaj landoj

**Aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso

| | | |
|---|---|---|
| ĝis 31 12 2021 | **A**: 20,- EUR | **B:** 40,- EUR |
| ĝis 31 03 2022 | **A:** 30,- EUR | **B:** 50,- EUR |
| post 01 04 2022 | **A**: 40,- EUR | **B:** 60,- EUR |

**Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo:**

**A:** 220,- EUR **B:** 280,- EUR
Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR
La kongreskotizo inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn

**Grava atentigo!** La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.
Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

**La aliĝon oni traktos kiel validan** post ricevo de aliĝ-kotizo!
Aliĝ- kaj kongres-kotizon oni povas sendi al la banka konto de:

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes:
Ĝiro-nro (IBAN): HU59 1177 5070 1279 2889 0000 0000
SWIFT: OTPVHUHB

aŭ al la konto **kelk-p** de KELI ĉe UEA

aŭ al la konto de KELI ĉe CIC Lyonnaise de Banque en Francio:
KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale
Ĝiro-nro (IBAN): FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104
SWIFT: CMCIFRPP

**La aliĝilon sendu al:**

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
Perletere: HU-1400 BUDAPEST, Pf.: 5.
E-mail: agnes@raczkevy-eotvos.com

# Dag Hammarskjöld – 60 jaroj post la morto

*1905 – †1961

Kompilis Bengt Olof Åradsson, SE

Dag Hammarskjöld estis Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj de 1953 ĝis 1961, kiam li mortis en aviadila akcidento, en Afriko.

Li naskiĝis la 29an de julio 1905 en Jönköping, Svedio. Lia patro Hjalmar Hammarskjöld estis prezidanto de kortega tribunalo, poste la ĉefministro de Svedio.

Dag iĝis juristo kaj fakuliĝis kiel ekonomikisto. Li laboris en la registaro de la socialdemokrata Tage Erlander kiel ministro pri fremdaj aferoj, kiam oni lin nomumis al posteno de la ĉefsekretario de UNO, kaj li enoficiĝis je UNO la 10an de aprilo 1953.

En postmilita tempo en la mondo dominis tensio inter la superpotencoj Usono kaj Sovet-Unio. Dum la malvarma milito Hammarskjöld solvis aŭ klopodis solvi pli ol 20 krizojn internaciajn.

Kvankam Dag Hammarskjöld subtenis pacajn agadojn, li volis, ke UNO havu ankaŭ militan povon. Li fondis la unuan pacsekurigan korpon por UNO dum la krizo ĉe Suezo en 1956.

Hammarskjöld estis tre populara ĉe malgrandaj ŝtatoj kaj reelektiĝis en 1957.

Dag Hammarskjöld mortis la nokton inter la 17a kaj 18a de septembro 1961 en ofica vojo en Afrikon dum la Konga krizo. Post morto li gajnis la Nobel-premion pri paco en 1961.

Dag Hammarskjöld estis ankaŭ poeto kaj estis ano de la Sveda Akademio. Post la morto manuskripto kun la titolo Vojsignoj [Vägmärken] estis trovita en lia hejmo. Ĝi estis kolekto de maksimoj kaj liberaj versoj; kvankam Hammarskjöld mem nomis la kolekton taglibro, aŭ "blanka libro", "pri miaj intertraktadoj kun mi mem – kaj Dio". Malgraŭ sia propra priskribo, la tekstoj tute ne temas pri ĉiutagaj eventoj, sed estas malgrandaj notoj pri nenomitaj homoj, pri Dio, moralo kaj vivaj komprenoj.

Inter la maksimoj rimarkeblas:

*Neniam permesi la sukceson kaŝi sian malplenon, la penon sian neniecon, la laborvivon sian dezerton, kaj tiel konservi la spronon por atingi plu — la doloron en la animo, kiu nin pelas. Ne reenrigardu. Kaj ne revu pri la estonteco: ĝi ne redonos al vi la pasintecon aŭ kontentigos aliajn sonĝojn pri feliĉo. Via devo kaj via rekompenco – via destino – estas ĈI TIE kaj NUN.*

La teologiaj aspektoj de la fenomeno Hammarskjöld estis ĉefa temo en la lastatempa intereso. Mats Svegfors en sia libro Dag Hammarskjöld – la unua moderna svedo, i.a. klarigas la konceptojn ĉirkaŭ mezepoka germana religia mistikismo, kiu estis grava fonto de inspiro por Hammarskjöld. La traduko fare de Hammarskjöld de Martin Buber estas alia signo de la sama karaktera trajto.

# Bona konduto de kristanoj

## Reago rilate al artikolo en Dia Regno 1/2021

Mark Hamme, Usono

Karaj gefratoj, mi preskaŭ silentiĝis dum la pandemio pro manko de tajpmaŝinaliro. Preskaŭ ĉiuj el la 1500 federaciaj malliberuloj en Tuksono kaj la plejparto de la laboristoj jam infektiĝis de la kronviruso kaj resaniĝis. Sed bedaŭrinde 6 malliberuloj mortis. Ni preskaŭ funkcias kiel antaŭe nun, danke al Dio.

Nathan Gant entute pravas pri la malbona konduto de multaj tielnomataj kristanoj ĉi-tie [vidu Dia Regno 1/2021 /red.]. Bedaŭrinde, la gvidantoj de multaj 'evangeliaj' kristanaj sektoj en Usono subtenis la eksprezidanton Trump, adorante lin, malgraŭ la fakto, ke li estas la malo de ĉiu bono, kiun ni lernas en la preĝejoj kaj infanlernejoj. Trump negas la seriozecon de la pandemio, ankaŭ lia kulto faras tion. Se li diras, ke ne necesas porti la maskon, liaj adorantaj rifuzas fari tion. Se li diras, ke oni rajtas rifuzi la vakcinon kaj fari ĉion kiel antaŭ la pandemio, kaj ne gravas, kiom da homoj infektiĝos kaj mortos ankoraŭ, liaj disĉiploj insistas je siaj rajtoj.

Ĉu ni VERE rajtas riski nian propran sanon kaj vivon, eble la sanon kaj vivon de aliuloj? La du plej gravaj ordonoj de Dio. "*Amu la Eternulon vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj via tuta menso. Ĉi-tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj la dua similas al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem.*" Mateo 22:27–39

Do, se ni volas vere ami Dion kun nia tuta forto, animo, kaj menso, ĉu ni risku la sanon kaj vivon, la du plej grandaj donacoj de Dio ĉar ni kredas je niaj rajtoj? Ĉu ni risku la sanon kaj vivon de nia proksimulo se ni amas lin? TUTE NE!

Frato Gant rilatis al la konduto de la adorantoj de Trump kun la ordono diferencigi inter la sanktaĵo kaj la ordinaraĵo. La respondeco de homoj rilate al la pandemio, aŭ manko de tio, laŭ la 2 plej grandaj ordonoj estas alia diferenco. laŭ Malaĥi 3:18 "*Kaj vi denove vidos la diferencon inter virtulo kaj malvirtulo, inter tiu, kiu servas al Dio, kaj tiu, kiu ne servas al Li.*"

Ĉiam bonvolas vian korespondon. Nuntempe ni havas estron, kiu ne toleras la emon de oficiroj kiuj forĵetadis niajn leterojn.

Frate,
Mark Hamme
USP
P.O. Box 24450
Tucson, AZ 85734
Usono

## Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier

**de 2022-03-16 ĝis 2022-03-20 (merkredo - dimanĉo)**

**Nia kunvenejo:**
**Romi-urba junulargastejo**
**Famili- kaj Junular-gastejo**
**An der Jugendherberge 4**
**D-54292 Trier**
Tel. 0049 651 14662-0

trier@diejugendherbergen.de
www.jugendherberge-trier.de

Situo: ĉ. 1.800 m nordokcidente de la ĉef-stacidomo, ĉe la rando de la urbokerno, proksime al la rivero Mosel

### Organizanto:
Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.
Prezidanto: Wolfram Rohloff, Am Marktplatz 82, D-09496 Marienberg-Zöblitz

### Partopren-kotizoj:
La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en 2-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/ necesejo, ekskursa programo 225 € (post 2021-11-30 240 €) por ĉiu persono.
Kiu venas el eksterlando, ricevas rabaton de 40 €.
Krompago por 1-lita ĉambro (haveblas nur malmultaj): 32 €.

### Programo
Diskutoj kaj prelegoj pri religiaj temoj, komunaj preĝado kaj kantado el ”Adoru”.
Wolfram Rohloff preparas la kadran temon: “*Ĉu bibliaj, ĉu duakanonaj aŭ ĉu apokrifaj, sed tamen legindaj? La apokrifoj de la Malnova Testamento.*”
Ĵaŭde ĝis sabate: Ulrich Matthias gvidos posttagmezan ekskursan programon en Trier kaj ĉirkaŭo. Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: www.esperanto.de/keli.
Muzika organizanto: Stefan Lepping

### Kondiĉoj de aliĝo
Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston nepre pagu ĝis la **14a de januaro 2022**, ĉar la junulargastejo postulas ĝis tiam la pagon de la kotizoj. La antaŭpago ne estas repagebla, sed vi povas ĉiam aliĝigi anstataŭanton (samseksan). Kiu havas tro malmultan monon por povi pagi la partoprenkotizojn, turnu sin al la komisiito pri eksterordinara subvencio.

### Ajnajn demandojn direktu al la komisiito por la Bibliaj Tagoj:
Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 151 5133 6794
💻 fischru@uni-muenster.de

### Maksimuma nombro de partoprenantoj: 29

## Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj de 2022-03-16 ĝis 2022-03-20 en Trier.

(titolo+)nomo: ________________________________________

strato/domnum.: ________________________________________

kodo, urbo: ________________________________________

telefono: ________________________________________

poŝtelefono: ________________________________________

retpoŝta adr.: ________________________________________

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐

☐ Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun:

Nomo: ________________________________________

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐

☐ La sumon de ________€ mi ĝiris je

______________________ (dato)

al la sekvanta konto:

☐ Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

☐ UEA-konto de Rudolf Fischer: rfis-w

Rimarkigoj / proponoj:

________________________________________

________________________________________

________________________________________

________________________________________

**Bv. sendi la suprajn datumojn poŝte aŭ elektronike al:**

D-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-48356 Nordwalde, Germanujo
🖳 fischru@uni-muenster.de

# *La poemo de savo*

***Jesuo, vi mortis sur la kruco.***

***Resurektinta, por savi nin.***

***Pardonon, Sinjoro pro miaj pekoj.***

***Vi, mia amiko, estu mia Savanto.***

***Ŝanĝu mian vivon, ŝanĝu mian koron.***

***Mi volas, Sinjoro, vivi por vi.***

Via fidelulo en Kristo
*Honoré Sebuhoro*




# *Preĝo de Sereneco*

*Dio mia,*
*Donu al mi la serenon*
*Akcepti*
*Kion mi ne povas ŝanĝi,*
*La kuraĝon*
*Ŝanĝi kion mi povas ŝanĝi,*
*Kaj la saĝecon*
*Koni la diferencon.*

*Reinhold Niebuhr*

# Informetoj

Saluton, geamikoj!

**Ekde nun, mi havas novan adreson, jene:**

**Jerald Veit**
**2844 S 48th St**
**Milwaukee, WI 53219-3301**
**USA / Usono**

**Mia retpoŝta adreso restas same, kiel antaŭe.**

## Esperant', Ernesto, estas via ĝojo




Bedaŭrinde la dua strofo de la akrostiko por Ernst Leuze mankis en la pasinta numero.
Jen:

2. **L**a orgen-ludado estas via ĝuo.
   **E**l aer' muzikon formas fingro, ŝuo.
   **U**ragane brue pompas bas-fajfilo.
   **Z**efirece milde ĉarmas flut-jubilo …
   **E**stu, Ernesto, gratulo al vi, ovaci', aplaŭd'.

ESPERANT', ERNESTO, ESTAS VIA ĜOJO • M kaj E (originale verkita kiel akrostiko): Albrecht Kronenberger 2021-07-17

# Nu, kien iras mia viv'

(originale verkita en Esperanto)




2. La gloro estas mia cel',
la amo mia vojo.
  La sun' min prenas el malhel'
  kaj el soif' la rojo.
Tiele mi de fort' al fort'
  pilgrimas transen, tra la mort',
al Di', al Lia ĝojo.

3. Do: Sonu mia dank' al Di',
la Patro, Fil', Spirito;
  ĉar mian vivon vivas Li
  kun mi sen intermito.
Li, mia puls', Li, mia spir',
  la fund' de mia kordezir',
vivigas sen merito.

Oni povas elekti alian sam-ritman melodion
(la tiel nomatan Luteran Strofon), ekzemple:

ADORU 093 Sei Lob und Ehr - Crüger
ADORU 245 Ich steh an deiner Krippen hier - Bach
ADORU 494 Luther's Hymn - Luther
ADORU 528 Lobt Gott den Herrn, ihr - Vulpius

NU, KIEN IRAS MIA VIV' • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2021-10-05